

## Eŭropo Demokratio Esperanto

Ĉu vi kontentas pri la funkciado de Eŭropa Unio? Ĉu vi deziras plibonigi ĝin? Jes? Venu ĵaŭde je la 17h00 en la salonon *Grzębowski* en MRES, 23 str. Gosselet (vidu la mapon sur p. 9 de KL), kaj ekkonu niajn proponojn.

Pierre Dieumegard, KN 1074

## Matematikistoj, kunvenu!

Antaŭ trideko da jaroj tre aktivis IAdEM – Internacia Asocio de Esperantistaj Matematikistoj. Sed ĝi malaperis. La celo de la ĉi-kongresa kunsido estas revivigi ĝin. Ĉiuj, kiuj interesiĝas pri matematiko, bonvolu veni en salonon *Cart* ĵaŭdon je la 15h15 por kune pristudi la eblon refondi IAdEM.

François Lo Jacomo, KN 1009

## Radioamatoroj kunvenos

Radioamatoroj kaj interesiĝantoj pri la temo estos bonvenaj partopreni kunsidon ĵaŭde je la 18h30 antaŭ la rendevuo-tabulo. La radioamatora stacio TM100E aktivas dum la semajno sur la koridoro de la 7a etaĝo, apud la salono *Cart* (*Faidherbe 2*).

Enivaldo Ales Silva, KN 124

## Ligo de gesamseksemuloj LSG

Ĵaŭde de la 18h00 ĝis la 22h00 renkontiĝos sur la strato *19 Condé* en Lillo LSG-anoj kun la gvidanto s-ro Randy A Dean, KN 1006, kaj prezentos LSG-on al la loka gesamseksemula asocio *J'en suis, j'y resta* en la GLAT-asocio, dum publika kuntrinkado.

S-ino Solange-Agnes Duron, KN 1008

## Medicinistoj kunvenis

Marde 28 jul 2015 je la 12h45 renkontiĝis en la salono *Babin 53* membroj de UMEA el 21 landoj, inter ili gastoj s-ino Todor, prezidantino de IFEF, kaj s-ro Schicke, prezidanto de INA. Estis prezentitaj faktoj pri la aktuala stato de UMEA kaj projektoj por diskonigi Esperanton kaj pri esploroj pri Yumeiho.

D-ro Christoph Klawe, KN 646

## Kunsido de ATEO

En mardo, 30 membroj de ATEO (Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo) ĉeestis la administran kunsidon. Ili aŭdis raportojn pri la kontetiga financa situacio de la asocio, kaj pri sukcesa ekstera agado fare de la vic-prezidanto Dominique Simone. Ĉar la redaktoro Christian Rivière deziras retiriĝi fine de la jaro, oni invitis sinproponojn pri nova redaktoro. José Antonio Vergara salutis la kunvenon nome de la estraro de UEA.

La publika kunveno de ATEO okazos ĵaŭdon en salono *Pauli* je 16h30 - 18h00. La temo "Ateismo kaj la rajto je libera esprimiĝo" estis inspirita de la tragedia okazintaĵo en januaro, kiam laborantoj ĉe la

franca satira revuo *Charlie Hebdo* estis mort-pafitaj de religiaj ekstremistoj, ankaŭ de la murdoj en tri apartaj okazoj ĉi-jare de tri kontribuantoj al sekulara blogo en Bangladeŝo. Ĉiuj interesatoj estas invititaj ĉeesti.

Anna Löwenstein, KN 1948

## Aŭtoraj Duonhoraj (en la libroservo, salono Schwartz)

### Ĵaŭdo – 30.07.2015

**10h00 – Marjorie Boulton:** “Vid-al-vide kun nia plej elstara Esperanto-poetino”. Konversacio kun la aŭtorino.

**11h00 – Stano Marček:** “Esperanto per rekta metodo” en 36 lingvoj, didaktikaj materialoj, sonlibroj.

**12h00 – Katalin Kováts:** “Novaj lernomaterialoj”.

**14h00 – Kalle Kniivilä:** „Miaj du novaj libroj”.

**15h00 – Nicola Ruggiero:** Mia ĵusa poemaro „La kanto de l’ korvo”.

**16h00 – Peter Baláž:** „Nova eldono de KAEST-prelegaro 2014 pri Arkivoj kaj Bibliotekoj”.

**17h00 – Amri Wandel:** mia ĵus aperinta E-traduko de la rakonto “Esperanto”, parto de unu el la lastaj libroj de la fama israela verkisto Amos Oz. Amri rakontos ankaŭ pri siaj renkontiĝoj kun Oz kaj pri la speciala rilato de Oz al Esperanto.

### Vendredo – 31.07.2015

**10h00 – Hori Jasuo kaj Yamakawa Setsuko:** “Espero por la Madei-vilaĝo Iitate”. Japana bildlibro kun Esperanta traduko pri vilaĝo poluita de radioaktiveco pro la akcidento de nuklea centralo post la granda tertremo la 11-an de marto 2011 (Yamakawa Setsuko); “Memoroj pri la Japana Katastrofo”: fotopoemaro pri homoj kaj urboj en la damaĝitaj regionoj de la Katastrofo de la 11a de marto 2011 (Hori Jasuo).

**11h00 – Roman Dobrzyński:** „La laste faritaj filmoj i.a. *Bona Espero – nia tero*”.

**12h00 – Zlatko Tišljár:** „Lingvomanio” – proverboj kaj idiomoj de 28 lingvoj en Eŭropo.

**14h00 – Nicole Else:** *Foreign languages what they don't often tell you*. La libro estas en la angla, sed kompreneble ĝi havas plurajn paĝojn pri Esperanto.

**15h00 – Probal Dasgupta:** „Loĝi en la lingvoj”.

**16h00 – Ian Fantom:** „Taglibro de Malliberulo” de Hussain al-Amily, reredaktita kaj kompletigita anglalingva versio de la libro.

**Aktualaj informoj pri la 100-a UK en Lillo kaj la kongresa kuriero Belfrido en pdf-formato troveblas ĉe <http://www.uea.org/kongreso/>**



KONGRESA KURIERO DE LA 100-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

# Belfrido

Ĵaŭdo, 30 julio 2015

N-ro 4

## Pri la Tago de Lernado

Ĝi okazis la 28-an de julio 2015 en la salono Bakker.

Je la 9-a horo post oficialaj salutoj estis transdonita la Unua Premio Mauro la Torre al Profesoro Davide Astori el Italio (sur la foto).

Sekvis riĉa programo, kadre de kiu estis prezentitaj al la ĉeestanta publiko 14 interesaj prelegoj kun variaj temoj, kies enhavo rilatas al instruado kaj edukado.

Jérôme Caré el Francio prezentis koncize la francan edusistemon.

Renée Triolle el Francio en sia prezento pri la lingvo-instruado starigis la demandon “Ĉu malfermita pordo aŭ enkaĝigo?”.

Mireille Grosjean, Svislando, la prezidanto de ILEI, vekis la intereson de la ĉeestantoj per la temo “Pacdukado, paŝoj al plena konkretiĝo” kaj per sia dua parto “Raporto pri la Tria Tutmonda Kolokvo”, okazinta ĉi-jare en Svislando.

Prof. d-ro Alan Bishop el Aŭstralio prezentis prelegon kun la titolo “Valoroj en Esperantujo, iliaj karaktero kaj evoluo en edukado”, post kiu sekvis prof. d-rino Ilona Koutny el Pollando, kies alparolo tuŝis la temon “interkultura komunikado kaj Esperanto en universitata programo.”

Kun intereso oni aŭskultis la prezenton de Stefan MacGill, vic-prezidanto de UEA, pri Aktivula Maturigo (AMO) tra 16 monatoj kaj pri la tendenco, ke la AMO-seminarioj fariĝas pli kaj pli konataj kaj praktikataj en Esperantujo.

Alvenis poste d-rino Veronica Poór, Hungario, por prezenti detale kaj ekspliki la iniciaton “muzaiko”:



kiajn kapablojn evoluigas la aŭskultantoj; la juna prelegantino atendas novajn kunkreantojn en tiu alloga projekto, troviĝanta ĉe [www.muzaiko.info](http://www.muzaiko.info).

Post 20-minuta paŭzo estis la vico de prof. Dennis Keefe, Ĉinio, por prelegi pri la filozofio de John Dedew kaj la enmeto de internacia kulturo en la kursojn.

Prof. Nina Daniljuk, Ukrainio, ligis sian paroladon al “Interkulturaj edukado kaj komunikado en la universitata Esperanto-Centro”.

Prof. Duncan Charters, Usono, klarigis al la aŭskultantoj “kiel plej efike lerni Esperanton kaj aliajn lingvojn”.

Prof. d-rino Xiaofeng Gong, Arko, Ĉinio, sukcesis konvinki la ĉeestantojn per sia prezento “Kapabligho de transkultura komunikado kaj Esperanto-instruado”.

Post ŝi honorigis la ĉeestantaron la prezidanto de UEA prof. d-ro Mark Fettes, Kanado, kiu per sia parolado interesis pri Esperanto kadre de interkulturaj kaj tutmondecaj studoj, usona eksperimento”, subtenata de ESF.

La lasta parto de la kongresa programo “Tago de Lernado” konsistis el pliaj du prelegoj. Nun la jam tre konata d-rino Katalin Kováts, Nederlando, sugestis al instruistoj “kiel oni povas lerni Esperanton pere de modernaj teknologioj”.

Stano Marček, Slovakio, la aŭtoro de la instru-libro “Esperanto per rekta metodo”, jam en 36 lingvoj, prezentis detalojn pri la progreso de la projekto.

Dum la ĝenerala ferma diskuto la gvidantoj de la Tago Marija Beloŝević, Kroatio, kaj Jenifer Bishop, Aŭstralio, kune kun Mireille Grosjean, prezidanto de ILEI, dankis al la prelegintoj kaj al la publiko, kiu dum ses horoj ne perdis sian paciencon nek la okazon profiti de novaj instruoj je la bono de la propra spertiĝo.

Mihai Trifoi, KN 1225

## Serĉataj estas volontuloj!

La kongresa Libroservo serĉas volontulojn. Se vi pretas helpi, bv. enskribiĝi en la liston de helpantoj, kiu kuŝas inter la Ekskursaj Giceto kaj Kasisto de UEA, sur la longa budo ĉe la enirejo.



## IKU / Scienca Kafejo

1. La prelegoj de Gobbo kaj Larsson (laŭ la KL) estis interŝanĝitaj.

2. En la programo de Scienca Kafejo, ĵaŭde 15h00-16h30 en MRES, aldoniĝis al la programo de la KL (p.69) kvina prelego: Traunmueller pri “La plej vaste uzataj vortoj”.

3. En la IKU-AIS kurso 1 (Wandel, pri Einstein kaj relativeco) partoprenis ĉ. 90 personoj, el ili ekzameniĝis rekorda nombro de 67. La AIS-atestojn oni povos preni en la kongresa informejo vendrede, aŭ ricevi retroŝte, petante per [amriwandel@gmail.com](mailto:amriwandel@gmail.com).

Amri Wandel, KN 980

## La furora monodramo Ursula

La teatraĵo **Ursula – la krio de infano kontraŭ milito** (KL, p. 73) pro tre granda intereso de la publiko (la du prezentoj ne akceptis ĉiujn interesiĝantojn) okazos la trian fojon vendrede je la 15h15 en la salono *Lapenna*.

## Ĉu ne eblas? Ni ebligas!

### Neformala babilado pri subvenci-akirado

La kerna rolo de subvenci-akirado por subteni niajn agadojn estas pli kaj pli reliefigata dum la kongresaj laboroj; tamen, por atingi sukcesajn rezultojn tiukampe, nepre bezonatas fakaj konoj kaj spertoj.

Tial, kaj kiel jam antaŭanoncite dum la Kleriga Lundo fine de la programero dediĉita al prezento de sukcesaj edukadprojektoj, neformala kunveno kun fakuloj de la profesia firmao Kosmo Strategio Ltd. okazos vendredon la 31an de julio je la 14a ĉe la kongresa kafejo (nivelo 3). Nenio aparta bezonatas por partopreni: nur kunportu viajn ideojn kaj multe da kunlaboremo por kunstarigi novajn projektojn!

Maria Rosaria (Sara) Spanò, KN 990

## AVE kunvenis

Asocio de Verduloj Esperantistaj kunvenis la 28an de julio en la salono *Cart*. Ĉeestis ĉirkaŭ kvindek partoprenantoj. La sekretario de AVE Manfred Westermayer salutis kaj diris: “Nome de la Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE) mi salutas ĉiujn esperantistojn okaze de la 100-a Universala Kongreso en Lillo. Ni kunlaboras kun UEA jam delonge kaj ĝojas, ke la nocio Daŭrigeblo iĝis grava temo ankaŭ por la oficiala laboro de UEA. Ĉi-rilate UEA sekvas UN, kiu lanĉos la Daŭripovajn Evoluo-Celojn en septembro 2015. Ni ankaŭ kunlaboras regione kaj tutmonde kun Verdaj Partioj kaj Civil-Sociaj Organizaĵoj, por redukti la riskojn pro nia iom abunda vivstilo, kaj subtenas per informado Transiron el la fosilia erao en la urboj kaj ŝtatoj. Ni atendas ke la ĉi-jaraj Klimataj Pinto-Interkonsentoj en Parizo atingos cel-trafajn decidojn, kaj ni kunlaboras kun *Alternatiba*, kies teamo faras

kvin-mil-kilometran bicikladon por informi en centoj da urboj en Francio kaj meza Eŭropo pri la celo redukti la homan karbondioksidan ĝenon al la tutmonda klimato. Paralele ni subtenas konkretajn agadojn cele la realigon de la t.n. Miljaraj Evoluaj Celoj de UN, ligitaj i.a. kun la nomo de Wangari Maathai – aparte pri rearbarigo kaj salubra trinkakvo. Vi trovos la dokumentojn pri tio en nia retejo [verduloj.org](http://verduloj.org). Betty Chatterjee prezentis la trian projekton: akvo por Kalima. AVE subtenas akvo-provizadon por kvar mil familioj de tiu urbo de D.R. Kongo; detalojn vi vidos ĉe [verduloj.org/afriko.htm](http://verduloj.org/afriko.htm). Oni ankaŭ diskutis pri la kunlaboro kun la Verdaj Partioj, ene de kiuj necesas pli da esperantistoj por konvinki ilin pri la bezono de nova lingva politiko, aparte kadre de la eduka sistemo. Estiĝis kaj kritikoj kaj proponoj ene de tre multfaceta diskuto. Ekzistas larĝa interkonsento por renovigi la informsystemon de AVE dum la venonta jaro.

Michael Leibman, KN 1743

## Elstaraj prelegoj en la Scienca Kafejo

Marde 28 jul 2015 okazis ege altnivela prelego en la “Scienca Kafejo” (15h00, *Grzębowski*). Elstaris laŭ impreso de la raportanto prezentado de Piet Buijnsters pri la antaŭdiro de la fama estontologo Alvin Toffler ([https://eo.m.wikipedia.org/wiki/Alvin\\_Toffler](https://eo.m.wikipedia.org/wiki/Alvin_Toffler)). Estas nekredeble, kiel ekzakte tiu scienculo antaŭ 45 jaroj antaŭvidis la evoluojn, kiuj hodiaŭ iĝis ĉiutagaj faktoj. Oni konstatis, ke Esperanto, kvankam ne laŭvorte menciita de Toffler, tre bone konformas al la rimedoj de li rekomenditaj kontraŭ la “futurŝoko”.

Christoph Klawe, KN 646

## KER-kandidatoj, ATENTU!

Vendredon la ekzamenoj okazos NE en la kongresejo, sed en MRES (*23 rue Gosselet*). Ĝi troviĝas je ĉ. 30-minuta distanco, se vi piede iras.

Bonvolu informiĝi pri la loko kaj ekiri tien frue, por ke vi estu surloke ĝustatempe (vidu la 9an paĝon de via Kongresa Libro). Katalin Kováts, KN 1343

## La pitoreska Bruĝo

Post unuhora veturado ni estis en la pitoreska urbo Bruĝo. Unue ni promenadis tra la urbo, kvankam kelkfoje pluvis, plue ventis! Post tagmanĝo en bierfarejo *‘De Halve Maan’* ni boatveturadis sur la kanaloj. Belegaj scenoj! Ĉiĉeronaj samideanoj bonege gvidis nin. Dankegon. Neforgesebla ekskurso!

Somekawa Takatosi, KN 945

## Kunveno de RADE

Dimanĉe je la 18h00 en salono de *Crown*, Hotelo Plaza, okazis kunveno de Rotaria Amikaro de Esperanto kaj de Rotaria Klubo Esperanto. Leif Nordenstorm, prezidanto de la Rotaria Klubo

Esperanto, kunvenigis naŭ membrojn de la elektronika klubo, kiu estas la unua Esperanton parolanta klubo en la plej malnova asocio de servado *Rotary International* (R.I.), fondita en 1905 de la advokato Paul Harris en Usono. Eĉ se RADE ekzistas ekde la jaro 1928 kaj estis la unua amikaro en la movado de *Rotary International*, oni kapablis krei Esperanton parolantan klubon nur kiam la Leĝa Konsilio de RI permesis la ekziston de kluboj kunvenantaj rete. Tia klubo estis kreita por rotarianoj, kiuj multe vojaĝas, aŭ kiuj loĝas malproksime unu de la alia. Tamen nia klubo profitas de ĉiu UK por kunveni fizike kaj preni gravajn decidojn pri humaneca projekto, celo de la rotaria movado. La klubo decidis helpi projekton en Bona Espero. Temas pri integra agado de instruado, esploro kaj teknika asisto al 50 elektitaj adoleskantoj, vivantaj dise en ŝtataj setlejoj. Plie la klubo decidis doni al Davide Astori la titolon “Paul Harris Fellow” (grava titolo en R.I.)

Joseph van der Vleugel, KN 320

## Ĉu vi ŝatus kongresi en Romo, Italujo, la venontan jaron?

Tio vere okazos. Se vi iras al la salono *Grzębowski* je la 10-a ĵaŭde la 30-an de julio, vi povos ĉeesti la prezenton de la venontjara itala kongreso de Esperanto, kiu okazos fine de aŭgusto 2016 en la urbeto Frascati, tuj apud Romo. Fakte temos pri kongreso en Romo kun pli komfortaj dormlokoj. Pri italaj internaciaj kongresoj vi certe jam aŭdis. Temas pri kongresoj, kiuj kunigas la belajojn de Italujo kun abunda kultura programo kaj distraj vesperoj. Atentu, la salono *Grzębowski* estas en MRES (*Maison Régional de l'Environnement et de Solidarité*) en 23, rue Gosselet, Lille. Vidu la mapon en la paĝo 9 de la Kongresa Libro. Pliaj informoj pri la kongreso ĉe [kongreso@esperanto.it](mailto:kongreso@esperanto.it).

Renato Corsetti

## Lilla turodialogo

Kadre de la Kongresa Temo, prizorgite de d-ro Viana, lunde matene disvolviĝis la prelego de Franz-Georg Rössler sub la titolo “Turoj en la dialogo de la kulturoj”. Laŭ propraj bildoj kune kun aliaj ekzemploj la preleganto prezentis sisteme tutan turomondon. Elirante de naturaj turoj tra kastelaj, urbaj, alarmaj, defendaj, loĝaj, ĝis fabelecaj kaj metaforaj (“Waringhien kiel Esperanto-lumoturo”) la preleganto montris la funkcion de turoj en la komunikado de la homoj. Li ankaŭ avertis per iamaj turokatastrofoj, pri troa orgojlo dum la altigo de konstruaĵoj ĝis trans la nubojn. La Babela Turo jam konvinke pravigis tiun konstaton. Kelkaj intervenoj de la publikanoj pruvis, ke ili ne restis en la stato de simplaj E-turistoj, sed per la prelego fariĝis spertaj “turistoj” rilate al la kongrestemo.



## La Kompanoj kortuŝitaj

### Karaj kongresanoj,

Ni, La Kompanoj, dankegas vin pro via aktiva partopreno dum nia spektaklo. Viaj kunkantadoj, manfrapadoj kaj aplaŭdoj senmanke kontribuis al la sukceso de la nacia vespero. Varmajn mesaĝojn ni ricevis jen tuj post la prezentado, jen la sekvan tagon, kaj de jam konataj geamikoj kaj de multaj el vi, de ĉiaj originoj, kies radiantaj resendoj altvaloras por ni, amatora trupo. Sekve tre surprizis nin la granda nombro da kongresanoj, kiuj muzike paradis lundon posttagmeze tra la stratoj ĝis la stacidomo kaj la teatroplaco. Nefacile kalkuleblas kiom da ni tie kunkantis. Simple sciu, ke centon da libretoj kun partituroj ni disvendis antaŭ la kongreso. Krome ni pretigis 250 ekzemplerojn de nia kanzonaro. Tiu stoko tre rapide surloke elĉerpiĝis kaj mankis ekzempleroj jam longe antaŭ la fino, por kontentigi ĉies dezirojn. Ni memorigas, ke vi facile retrovos ĉiujn tekstojn, partiturojn, muzikojn kaj registraĵojn sur nia retejo [www.lakompanoj.free.fr](http://www.lakompanoj.free.fr). Plue plezure kunkantu en Esperanto!

Amuzike viaj, La Kompanoj

PS: Grava atentigo! Plurajn kanzonojn el nia repertuaro ni prezentis al vi sen permeso de nunaj posedantoj de la aŭtorrajtoj (ofte internaciaj diskoproduktistaj firmaoj, ne plu la verkistoj aŭ komponistoj mem de la originalaĵoj). Tial ni insiste petas la filmintojn, ke ili neniel enretigu iun ajn filmeton kun libera aliro. Nek de la nacia vespero, nek de la surstrata kunkantado. Ni kunĝuadis belegajn momentojn, kaj deziras eviti ĉiajn malagrablajn sekvojn. Korajn dankojn pro via komprenemo!

## T-ĉemizo de Muzaiko

Transprenu la ŝatatan T-ĉemizon de Muzaiko dum UK aŭ IJK sen sendokostoj por 8€! Ne restas multaj, do kontaktu Julia Noe (KN 1891). Vidu la elekton ĉe <http://muzaiko.info/t-cxemizo/>